Evangelio de Pseŭdo-Mateo

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling 2023

Fonto, el kiu estas tradukita:

paĝoj 179-242 de:

LOS EVANGELIOS APÓCRIFOS

Colección de textos griegos y latinos

versión crítica, estudios introductorios,

comentarios e ilustraciones

por

AURELIO DE SANTOS OTERO

segunda edición

BIBLIOTECA DE AUTORES CRISTIANOS

Madrid – MCMLXIII

Interrete:

Klarigo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Evangelio_laŭ_Pseŭdo-Mateo

La latina teksto (nur ĉapitroj 1 – 24) kun germana traduko:

Ĉapitroj 1 - 15: http://12koerbe.de/azur/ps-mt.htm
Ĉapitroj 16 - 24: http://12koerbe.de/azur/ps-mtth.htm

Lastfoje kontrolitaj: 2023-01-31.

Komenco de la libro

pri la naskiĝo de sankta Maria

kaj la infaneco de la Savanto

Verkis hebree la sankta apostolo Mateo
kaj la sankta pastro Hieronimo tradukis en la latinan[1]

---

[1] Plej verŝajne fikciaj indikoj.

A

Al sia frato plej amata, al la presbitero Hieronimo, – Ĥromatio kaj Heliodoro, episkopoj en la Sinjoro: saluton!

En apokrifaj libroj ni trovis la naskiĝon de la Virgulino Maria kaj la naskiĝon kaj infanaĝon de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Ĉar ni trovis tie multon, kion ni konsideris kontraŭa al nia fido, ni kredis ke ĉion ĉi ni devis malakcepti, por ne senintence doni plezuron al la Antikristo. Dum pri ĉio ĉi ni cerbumadis, stariĝis ĉe ni la sanktaj viroj Parmenio kaj Virino[2], kiuj diris ke via sankteco trovis la manuskripton, kiun la plej sankta Mateo mem verkis Hebree, en kiu estas priskribita la naskiĝo de Maria, la Virga patrino kaj la infanaĝo de nia Savinto.

Kaj tial ni petas vian bonvolemon per nia Sinjoro Jesuo Kristo mem, ke ĝin el la Hebrea vi transdonu al Latinaj oreloj, ne tiom por ekscii kiuj estas la mirakloj de Kristo, kiom por kontraŭi la ruzojn de la herezuloj; ĉar por instrui malĝustan doktrinon ili miksis mensogojn kun la ĝusta raporto pri la naskiĝo de Kristo, por per la dolĉeco de lia vivo teni kaŝita la amarecon de lia morto.

Estos do pura montrado de amo, se vi obeas la petojn de viaj fratoj aŭ se al la postulado de l' episkopoj vi havigu, kion ricevi vi kredas inda.

Fartu bone en la Sinjoro, kaj preĝu por ni.

B

Al la sanktaj sinjoroj, la plej benataj episkopoj Ĥromatio kaj Heliodoro, – Hieronimo, plej simpla servisto de Kristo en la Sinjoro: saluton!

Kiu ekfosas en grundo, en kiu trovigas oro, tiu ne tuj ekkaptas, por kio li komencis fosi; sed antaŭ ol brilan vejnon da oro li trovas, dumlonge li klopodadas renversante glebojn post gleboj, kaj li vivtenas sin per espero, kiun ankoraŭ neniu profito kreskigis.

---

[2] Nekonata.

Pezan laboron efektive mi ekprenis, kiam via sankteco ordonis al mi traduki ĉi tion, kiun eĉ ne povis aperigi la sankta apostolo kaj evangeliisto Mateo inter siaj skriboj. Se ja ne estus sekreto, li certe aldonus ĝin al la evangelio, kiun li aperigis. Sed ĉi libreton li verkis per hebreaj literoj por teni ĝin kaŝita, kaj neniel ĝis nun li publikigis ĝin, sed iamaniere li permesis tamen, ke ĝi diskoniĝis, kaj la aŭtografaĵo, kiun propramane li skribis, venis en la manoj de viroj plej piaj, kiuj ricevis ĝin de siaj antaŭuloj kiel valoraĵon[3]. Kaj ĉar ili tenis kiel regulon doni tiun ekzempleron al neniu, kaj aliaflanke ĝia enhavo ja diskoniĝis laŭ gusto de pluraj redaktantoj, unu versio – tiu de Leŭko, disĉiplo de Maniĥajo[4] (kiu diskonigis falsaĵojn pri la apostoloj), kiu faris pli da skandaloj ol da edifo al la piuloj; tial iu koncilio juĝis lin tia kanajlo, ke la Eklezio prefere neniel plu atentu pri li.

La mordado de l' kontraŭblekantaj hundoj nun ĉesu; ĉar ĉi libreton ni ne intencas enŝovi inter la kanonajn, sed por plej klare montradi la falsecon de l' herezo, ni transdonas la skribojn de Apostoloj kaj Evangeliistoj. Ni do obeas al la piaj episkopoj, same kiel ni kontraŭas la malpiajn herezojn.

Ni juste obeas al la Amo je Kristo, kredante, ke ni estas subtenataj per la preĝoj de ĉiuj, kiuj dank' al ĉi ago de obeemo povas ekkoni la sanktan infanaĝon de la Savanto.

Fino de la Prologo.

---

[3] Plej ĥaosa frazo.

[4] La profeto Mani ofte nomiĝas Maniĥaj, kio signifas *Mani vivas*.

Unua Parto

I.

1 En tiuj tagoj vivis en Jerusalem viro nomata Joaĥim el la tribo Juda. Li estis paŝtisto de siaj ŝafoj, timis Dion en sincero kaj kun bona koro. Neniun alian zorgon li havis krom pri siaj gregoj, el kies frukto li nutris ĉiujn Di-timantojn, prezentante duoblajn oferaĵojn pro timo antaŭ Dio kaj por tiuj, kiuj studis pri la Leĝo, kaj simplajn <oferojn> pro tiuj, kiuj obeis ĝin. Tiel el ĉio, kion li posedis, tri partojn li faris, de la ŝafoj, de la ŝafidetoj, de la lano aŭ de kiu ajn kion li povis posedi: unu parton li donis al la vidvinoj, orfoj, vojaĝantoj kaj malriĉuloj; la duan parton tamen li donis al tiuj, kiuj sin dediĉas al la kulto de Dio; la trian parton li retenis por si mem kaj sia tuta domo[5].

2 Dum tion li faris, Dio plinombrigis liajn gregojn, tiel ke ne estu unu simila al li en la popolo Izrael. Tion li komencis fari en sia dekkvina jaraĝo. Kiam li atingis la aĝon dudekjaran, li prenis kiel edzinon Anna-n, la filinon de Isaĥar, el sia tribo, t. e. el la idaro de David. Kaj kiam kun ŝi li restis dum dudek jaroj, filojn aŭ filinojn el ŝi li ne ricevis.

II.

1 Okazis, ke dum la festotagoj inter tiuj, kiuj oferu incenson al la Sinjoro, staris ankaŭ Joaĥim, obea al sia numero antaŭ la vizaĝo de l' Sinjoro. Sed aliris al li skribisto de la templo, kiu nomiĝis Ruben, kiu diris: «Ne decas, ke vi staru inter tiuj, kiuj plenumas oferon al Dio, ĉar vin ne benis Dio, ke vi ricevu semon en Izrael». Sentante sin do hontitigita antaŭ la popolo, li do plorante foriris de la templo de l' Sinjoro, kaj ne reiris al sia domo, sed li foriris al siaj gregoj, kaj siajn paŝtistojn li kondukis kun si inter la montoj al malproksima tereno, tiel ke dum kvin monatoj neniun mesaĝon povis aŭdi pri li lia edzino Anna.

---

[5] Vidu la libron Tobias.

2 Dum ŝi ploris en sia preĝado kaj diris: «Sinjoro Dio de Izrael, plej forta, kial al mi vi ne donis filojn? Kial ankaŭ mian edzon vi forprenis de mi? Jen jam kvin monatoj pasis kaj mian edzon mi ne vidas. Kaj mi ne scias, ĉu li mortis, ke por li tombon mi preparu?» Kaj dum en la ĝardeno de sia domo ege ŝi ploris, preĝante ŝi levis la okulojn al la Sinjoro, kaj ŝi vidis neston de paseroj en laŭro-arbo, kaj voĉon kun ĝemado ŝi elmetis al la Sinjoro: «Sinjoro Dio ĉiopova, kiu al ĉiu kreskaĵo donis idojn, ankaŭ al sovaĝaj bestoj, al azenoj, al serpentoj, fiŝoj kaj birdoj, kaj ĉiuj ĝojas pri siaj idoj, ĉu nur min vi ekskludis de la bonvolo de via dono?» Vi scias, Sinjoro, de la komenco de mia nupto mi min dediĉis al ĉi tio, ke se vi donus al mi filon aŭ filinon, ke tiun mi dediĉus al vi en via sankta templo».

3 Dum tion ŝi diris, subite antaŭ ŝia vizaĝo aperis anĝelo de l' Sinjoro, kiu diris: «Ne timu, Anna, ĉar via semo estas en la plano de Dio; kaj kio al vi naskiĝos, estos admirata en ĉiuj jarcentoj en eterno». Kaj kiam tion li diris, de ŝiaj okuloj li estis forprenita. Sed ŝi tremante kaj timplena, ke tian vizionon ŝi ricevis kaj tian voĉon ŝi aŭdis, eniris en sian ĉambreton kaj metis sin sur sian liton kvazaŭ mortinta, kaj la tutan tagon kaj nokton ŝi restis ege tremante en preĝo.

4 Post ĉi tio sian servisteton ŝi vokis al si kaj diris al ŝi: «Vi vidas ke mi defalis en vidvinecon, kaj mi estas en mizero, kaj ĉu vi ne volis aliri al mi?» Tiam murmurante tiu tiel respondis: «Se Dio fermis vian uteron kaj deprenis vian edzon de vi, kion mi do faru al vi?» Tion aŭdante, Anna des pli ploris.

III.

1 En tiu tempo aperis iu junulo inter la montoj, kie Joaĥim paŝtis siajn gregojn, kaj li diris al li: «Kial vi ne reiras al via edzino?» Kaj Joaĥim diris: «Dudek jarojn mi havis ŝin; nun tamen ĉar Dio al mi ne volis doni el ŝi filojn, mi vidis min devigita ofendite foriri el la templo de Dio: kiel mi povus reiri al ŝi, tiel forpuŝita kaj malhonorita? Ĉi tie tamen kun miaj ŝafoj mi estos, dum Dio al mi volas permesi la lumon de tiu ĉi mondo; per la manoj de miaj filoj tamen volonte mi fordonos al la malriĉuloj, la vidvinoj, la orfoj kaj al tiuj, kiuj Dion adoras, iliajn partojn».

2 Kiam tion li diris, la junulo respondis al li: «Anĝelo de Dio mi estas; hodiaŭ mi aperis al via edzino, kiu ploris kaj preĝis, kaj mi konsolis ŝin – mi scias, ke el via semo filinon ŝi ricevis[6]. Ŝi estos en la templo de Dio kaj Sankta Spirito ripozos en ŝi; kaj ŝia feliĉo superos ĉiujn sanktajn virinojn, tiel ke neniu povas diri, ke en pasinteco iu ajn estis al ŝi simila, sed ankaŭ post ŝi neniam venos iu en ĉi mondo simila al ŝi. Tial vi do descendu de la montoj kaj reiru al via edzino, kaj vi konstatos, ke ŝi estas graveda: Dio ja vekis la semon en ŝi, kaj tial vi dankodiru al Dio, kaj lia semo estos benata, kaj ŝi mem ankaŭ estos benata, kaj ŝi prezentiĝos kiel patrino de eterna beno.»

3 Joaĥim adorkliniĝis kaj diris: «Se gracon mi trovis antaŭ vi, bonvolu mallonge ripozi en mia tendo kaj benu min, vian sklavon». Kaj la anĝelo diris al li: «Ne nomu vin sklavo, sed kunsklavo mia; ĉar sklavoj ni estas de unu sola Sinjoro. Ĉar nevidebla estas mia manĝaĵo, kaj mia trinkaĵo ne povas esti vidata de mortidevaj homoj; kaj tial vi ne petu min eniri en vian tendon, sed kion vi intencis prezenti al mi, tion kiel holokaŭston vi prezentu al Dio».

Tiam Joaĥim prenis senmakulan ŝafidon kaj diris al la anĝelo: «Mi ne kuraĝus prezenti al Dio holokaŭston, se via invito ne donus al mi la oficon de l' oferado». Kaj la anĝelo respondis: «Mi ne invitus vin al tiu oferado, se la volon de Dio mi ne konus». Okazis, dum Joaĥim prezentis la oferon al Dio, ke kun la odoro de l' ofero kvazaŭ kun ĝia fumo la anĝelo malaperis al la ĉielo.

4 Tiam Joaĥim falis vizaĝalteren, kaj de la sesa horo de l' tago ĝis vespere tie li kuŝis. Kiam venis liaj knaboj kaj la taglaboristoj, kiuj ne sciis, kio okazis, ili timis, supozante ke li volis sinmortigi, kaj ili aliris kaj pene levis lin de la tero. Kiam al ili li rakontis, kion li vidis, ili ege konfuziĝis kaj instigis lin senhezite sekvi la ordonon de l' anĝelo kaj kiel eble plej rapide reiri al sia edzino. Kaj dum Joaĥim en sia koro pridiskutis, ĉu li devas retroiri, okazis, ke li estis kaptita de stuporo, kaj jen aperis al li dum li estis plene veka, la anĝelo, kiu en lia sonĝo estis aperinta, kaj tiu diris: «Mi estas la anĝelo, kiun Dio sendis al vi por gardi vin:

---

[6] Klare kontraŭas la aserton tuj postan: «Dio ja vekis la semon en ŝi».

malsupreniru sendanĝere kaj reiru al Anna, ĉar la agoj de kompatemo de vi ambaŭ estis voĉlegitaj antaŭ la vizaĝo de l' Plejaltulo, kaj vi ricevis tian semon, kian neniam de la komenco ĝis nun ricevis ĉu profetoj aŭ sanktuloj, nek iam okazos». Kaj okazis, kiam Joaĥim vekiĝis el sia sonĝo, li vokis al si siajn paŝtistojn, kaj rakontis al ili sian sonĝon. Sed ili adoris la Sinjoron kaj diris al li: «Atentu, ke anĝelon de Dio vi ne malŝatu; sed leviĝu, ni foriru kaj lantapaŝe paŝtante niajn gregon ni ekiru».

5 Kaj kiam tridek tagojn ili iris kaj jam proksimiĝis, aperis anĝelo de l' Sinjoro al Anna dum ŝi preĝis, kaj li diris al ŝi: «Iru al la pordego, kiu nomiĝas la Ora, rapidu renkonte al via edzo, ĉar hodiaŭ li venos al vi». Kaj ŝi haste leviĝis kun siaj servistinoj, kaj ŝi komencis stari preĝante en tiu pordego. Kaj dum iom longe ŝi atendis kaj iom ĝeniĝis pro la atendado, levante la okulojn ŝi vidis Joaĥimon alveni kun siaj gregoj, kaj Anna alkuris kaj pendigis sin je lia kolo, danke al Dio dirante: «Vidvino mi estis, kaj jen ne plu; sterila mi estis, kaj jen mi gravedas». Kaj fariĝis granda ĝojo al ĉiuj ŝiaj najbarinoj kaj konatoj, tiel ke la tuta lando de Izrael ekĝojis pro tiu novaĵo.

IV.

Post ĉio ĉi, kiam pleniĝis la naŭ monatoj, Anna naskis filineton, kaj nomis ŝin Maria. Sed kiam en la tria jaro ŝi ĉesis mamnutri ŝin, Joaĥim kaj Anna, lia edzino, foriris al la templo de l' Sinjoro, kaj prezentinte siajn donacojn al Dio, ili transdonis sian filinon Maria en la grupon da virinoj, kiuj tage kaj nokte restis tie por laŭdi Dion. Kiam antaŭ la templo de l' Sinjoro ŝi estis starigita, tiel rapide ŝi supreniris la dek kvin ŝtupojn, ke ŝi ne trovis la tempon retrorigardi kaj eĉ ne, kiel estis kutime ĉe infanoj, plu serĉis siajn gepatrojn. Ĉe tio ĉiuj estis stupore kaptitaj, tiel ke ankaŭ miradis la ĉefpastroj de la templo.

V.

Tiam, plena de Sankta Spirito, Anna diris antaŭ ĉiuj: «La Sinjoro de l' Armeoj memoris pri sia parolo, kaj per sia sankta vizito bonvolis honori sian popolon, por humiligi la gentojn kiuj leviĝis kontraŭ ni, kaj konverti

al si iliajn korojn; al niaj preĝoj li malfermis siajn orelojn, kaj la insultojn de niaj malamikoj li retenis de ni. Tiu kiu estis senfrukta, fariĝis patrino, kaj ŝi naskis jubilon kaj ĝojn en Izrael. Jen miajn donacojn mi povos prezenti al la Sinjoro, kaj miaj malamikoj ne povos malpermesi tion. La Sinjoro turnu iliajn korojn al mi, kaj donu al mi eternan ĝojon[7]».

VI.

1 Maria estis en la admiro de l' tuta popolo. Kiam trijara ŝi estis, ŝi iris per tiel adolta paŝado kaj tiel perfekte parolis kaj senĉese direktis sin en laŭdadon de Dio, ke ŝi ne plu impresis kiel infaneto, sed plenkreska, kaj estis kvazaŭ jam tridekjara, tiel ŝi persistis en la preĝado. Kaj ŝia vizaĝo brilis kvazaŭ neĝo, tiel ke apenaŭ eblis rigardi en ŝian vizaĝon. Sed ŝi persistis ĉe la lanfarista laboro, kaj ĉion, kion la maljunaj virinoj ne povis fari, tion ŝi realigis en sia tenera aĝo.

2 Tiu ĉi estis la vivregulo, kiun ŝi fiksis por si: De l' leviĝo ĝis la tria horo ŝi persistis en preĝado, de la tria horo ĝis la naŭa pri teksado ŝi okupiĝis, sed de la naŭa ŝi de la preĝado ne foriris ĝis la anĝelo de Dio aperis, el kies mano manĝaĵon ŝi ricevu, kaj pli kaj pli bone en laŭdado de Dio ŝi avancis. Fine kune kun la pli aĝaj virgulinoj ŝi tiel bone lernis laŭdi Dion, ke neniu estus trovebla pli lerta ol ŝi en la vigilado, neniu pli erudita ol ŝi en la scio pri la leĝo de Dio, nek pli modesta en humileco, nek pli pura en ĉasto, aŭ pli perfekta en ĉiu virto. Ŝi ja estis ĉiam konstanta, neskuebla, firma, kaj ĉiutage ŝi avancis.

3 Ŝin neniam iu vidis kolera, neniam ŝin iu aŭdis malbeni iun. Sed ĉiu ŝia diro estis tiel plena je graco, ke oni rimarkis, ke sur ŝia lango estas Dio. Ĉiam oni trovis ŝin ĉe preĝado aŭ ĉe traserĉado de l' Dia leĝo, kaj ŝi estis plenatenta pri ĉiuj siaj kunulinoj, ke neniu el ili eĉ per unu vorto peku, nek ĉe ridado tro alte levu sian voĉon, nek iu ajn konsideru sin egala al ŝi. Senintermite Dion ŝi laŭdis; kaj por ne deflankiĝi de l' laŭdo de Dio, kiam iu ŝin salutis, anstataŭ saluti ŝi ĉiam respondis «Dank' al Dio». De ŝi tiamaniere disvastiĝis la kutimo, ke homoj, kiam ili renkontiĝas

---

[7] Laŭ Luko 1:67 k.s.; 1 Samuelo 2:5.

reciproke sin salutas per «Dank' al Dio»[8]. Ĉiutage senescepte ŝi uzis por sia vivteno nur la nutraĵon, kiun el la mano de anĝelo ŝi ricevis; sed la manĝaĵo, kiun de l' ĉefpastroj ŝi ricevis, ŝi disdonis al la malriĉuloj. Ofte oni vidis anĝelojn paroli kun ŝi, kiuj kondutis kun ŝi kiel plej karaj amikoj. Sed se iu el la malsanuloj ŝin nur ektuŝis, tiu tuj sana iris hejmen.

VII.

1 La pastro Abiatar prezentis senfinajn donacojn al la ĉefpastroj, por ke li ricevu ŝin, por al sia filo prezenti kiel edzinon. Sed Maria malpermesis tion, dirante: «Ne povas okazi, ke viron mi agnosku, aŭ min viro». Sed la ĉefpastroj kaj ĉiuj liaj parencoj diris al ŝi: «Dio estas kultata en la filoj kaj estas adorata en la posteuloj, kiel ĉiam okazis en Izrael». Sed Maria respondis al ili: «Dio unue estas kultata en ĉasto, kiel facile pruveblas:
2 Ĉar antaŭ Abel estis neniu justa inter la homoj, kaj pro sia ofero li plaĉis al Dio, kaj kruele li estis murdita de tiu, kiu malplaĉis. Du kronojn tamen li akiris: unu pro sia ofero, kaj unu pro sia virgeco, ĉar al sia korpo neniun malpuriĝon li akceptis. Fine, ankaŭ Elias estis en la mortideva karno suprenprenita ĉielen ĉar sian korpon li konservis senmakula. Tio estas ĝuste, kion mi mem lernis en la templo de post mia infanaĝo: ke virgulino povas fariĝi plaĉa al la okuloj de Dio. Tial en mia koro mi decidis, ke neniam iun viron mi ekkonos».

VIII.

1 Okazis, kiam ŝi atingis la aĝon de dek kvin jaroj, ke estis okazo, kiu igis diri la Fariseojn, ke estas kutimo[9], ke neniu virino rajtas resti en la templo de Dio, kaj oni faris tian proponon, ke heroldo estu sendata tra ĉiuj triboj de Izrael, ke ĉiuj kunvenu en la tria tago en la templo de l' Sinjoro. Sed kiam kunvenis la tuta popolo, la pastro Abiatar ekstaris kaj iris pli supren, por ke li estu aŭdebla kaj videbla por la tuta popolo; kaj kiam estiĝis granda silento, li diris: «Aŭdu min, filoj de Izrael, kaj

---

[8] Vidu en Benedikto – La Regulo, 66:3.

[9] Frazo strange vortumita.

perceptu per viaj oreloj miajn vortojn. De post kiam de Salomono tiu ĉi templo estis konstruita, en ĝi estis virgulinoj, filinoj de reĝoj, de profetoj, pastroj kaj ĉefpastroj; kaj inter ili estis grandaj kaj mirindaj virinoj. Tamen, kiam ili atingis la laŭleĝan aĝon, ili estis donitaj por nupto, kaj en tio ili sekvis la ekzemplon de l' antaŭaj generacioj, kaj ili plaĉis al Dio. Sed Maria sola inventis novan kutimon, ĉar ŝi promesis al Dio, ke virgulino ŝi restos. Tial mi kredas, ke per nia pridemandado kaj per la respondo de Dio ni povos ekscii, al kiu ni devas konfidi ŝian prizorgadon».

2 Plaĉis tiu diro al la tuta sinagogo. Kaj la pastroj lotumis inter la dek du triboj de Izrael, kaj la sorto trafis la tribon Juda. Tiam diris la pastro: «Morgaŭ venu ĉiuj, kiuj ne havas edzinon, kaj ĉiu kunportu branĉon en sia mano». Okaze ankaŭ Jozef inter la junuloj venis kun sia branĉo. Kaj la ĉefpastro, kiu ĉiujn akceptis, prezentis oferon al Dio, kaj li pridemandis la Sinjoron. Kaj la Sinjoro diris al li: «Metu ĉiujn branĉojn en la internon de l' plej interna Sankta Sanktejo, kaj tie restu la branĉoj. Kaj ordonu ilin, ke matene ili venu al vi por rericevi siajn branĉojn, kaj el la pinto de unu branĉo leviĝos kolombo, kiu flugos ĝis la ĉielo; kiu rericevis tiun branĉon, kiu montris tiun signon, al tiu oni transdonu Marian por gardi ŝin».

3 Okazis, ke la sekvan tagon ĉiuj venis rapide; kaj post incens-oferado la ĉefpastro eniris en la Sankta Sanktejo kaj ekprenis la branĉojn. Kaj kiam ĉiujn li pritaksis kaj el neniu eliris kolombo, la pastro Abiatar ornamis sin per dek du sonoriloj kaj sacerdota vesto, kaj enirinte en la Sankta Sanktejo li ekbruligis la oferon. Kaj dum preĝon li verŝis, aperis al li anĝelo, kiu diris: «Estas ĉi tie branĉo tre eta, kiun vi kredis senvalora, kaj kiun kun la ceteraj vi flankenmetis: se tiun vi prenas kaj bone atentas, vi vidos, ke en ĝi estiĝis la signo, pri kiu mi parolis». La koncerna branĉo apartenis al Jozef, sed ĝi estis flankenmetita, ĉar li estis maljuna, kaj por ne esti devigita akcepti ŝin, li ne volis repostuli sian branĉon. Kiam humile tie li staris kiel lasta, la pastro Abtiatar laŭtavoĉe diris al li: «Venu kaj ricevu vian branĉon, ĉar oni atendas vin». Kaj antaŭeniris Jozef timplene, ĉar kun granda voĉo la ĉefpastro lin vokis. Sed baldaŭ sian manon li elstreĉis por ricevi sian branĉon, kaj tuj eliĝis el ĝia pinto

kolombo pli brila ol neĝo, ege bela; kaj fluginte iom tra la supro de l' templo ĝi ekcelis ĉielen.

4 Tiam la tuta popolo gratulis la muljunulon, dirante: «Benata vi estas en via oldeco, ke Dio montris vin inda akcepti Marian». Sed kiam la pastroj diris al li: «Akceptu ŝin, ĉar el la tuta tribo de Juda nur vi de Dio estis elektita», kun ĉia reverenco kaj konfuzo li komencis diri: «Maljunulo mi estas kaj filojn mi jam havas, kial vi konfidas al mi tiun infaneton?», sed tiam diris la ĉefpastro Abiatar: «Memoru, Jozef, kiel pereis Datan, Abiram kaj Koraĥ[10], ĉar ili malŝatis la volon de Dio. Tiel okazos al vi, se vi malŝatos, kiom al vi Dio ordonas». Kaj Jozef respondis al li: «La volon de Dio mi ne malŝatos, sed ŝin mi gardos, ĝis kiam estos komprenebla el la volo de Dio, kiu el miaj filoj ŝin povos ricevi kiel edzinon. Estu prezentataj kelkaj el ŝiaj virgaj amikinoj, kun kiuj ŝi portempe povas amikiĝi». La ĉefpastro Abiatar respondis: «Jes, kelkaj virgulinoj estos indikataj, por konsoli ŝin, ĝis venos la indikita tago, en kiu vi akceptos ŝin, ĉar al neniu alia ŝi povos esti nuptita».

5 Tiam Jozefo akceptis Marian kun kvin aliaj virgulinoj, kiuj ŝin akompanis en la domo de Jozef. Estis tiuj virgulinoj Rebeka, Sefora, Susana, Abigea kaj Zahel; la ĉefpastroj donis al ili silkon, katunon, purpuron kaj linon. Ili lotumis inter si, kiu virgulino kion prilaboru; okazis, ke Maria ricevis la purpuron por velo de l' templo de la Sinjoro. Kiam tion ŝi ricevis, diris al ŝi la virgulinoj: «Ĉar vi estas la plej juna el ĉiuj, vi meritis ricevi ls purpuron». Kiam tion ili diris, ili komencis iom ŝerce nomi ŝin reĝino de l' virgulinoj. Kiam tion ili intertraktis, meze de ili aperis anĝelo de Dio, kiu diris: «Tiu diro ne estas nura ŝerco, sed estas aŭtenta profetaĵo». Ili ektimis antaŭ la aspekto de l' anĝelo kaj pro lia diro, kaj petis lin, ke li pardonu ilin kaj preĝu por ili.

IX.

1 Sekvatage, dum Maria staris apud la fonto kaj plenigis sian kruĉon, aperis al ŝi anĝelo de l' Sinjoro, kiu diris: «Benata vi estas, Maria, ĉar

---

[10] Nombroj 16:1

loĝejon vi preparis en via utero por la Sinjoro. Jen venos de l' cielo lumo por loĝi en vi, kaj trabrilos per vi la tutan universon».

2 Tri tagojn poste, dum per siaj manoj la purpuron ŝi prilaboris, envenis al ŝi junulo, kies belecon ne eblas priskribi. Kiam Maria lin vidis, ŝi ektimis kaj skuiĝis. Li diris al ŝi: «Ne timu, Maria, ĉar gracon vi trovis ĉe Dio: jen vi ricevos en via utero kaj naskos reĝon, kiu regos ne nur surtere sed ankaŭ enĉiele, kaj li regos en la jarcentojn da jarcentoj».

X.

1 Dum tio ĉi okazis, en Kafarnaum apudmara Jozef okupiĝis pri sia laboro, ĉar lignaĵisto li estis, kaj naŭ monatojn tie li estis okupita. Kiam hejmen li revenis, li trovis Marian graveda. Kaj li komplete konfuziĝis, kaj tute mizera li ekkriis: «Sinjoro Dio, akceptu mian spiriton, ĉar estas al mi pli bone morti ol vivi». La virgulinoj, kiuj estis kun Maria, diris al li: «Kion vi diras, sinjoro Jozef? Ni ja scias, ke neniu viro ŝin tuŝis; ni scias, ke ŝia virgeco estas netuŝita en ŝi restas integra: ĉar ŝi estas gardita de Dio. Ĉiam kun ni ŝi restis en preĝado; ĉiutage kun ŝi parolis anĝelo de l' Sinjoro, ĉiutage el mano de Anĝelo nutraĵon ŝi ricevis. Kiel povus okazi, ke en ŝi estu plej eta peko? Ĉar se nian supozon vi volas, ke ni al vi malkaŝu: ŝin neniu faris graveda krom anĝelo de Dio».

2 Sed Jozef diris: «Kial vi min volas kredigi, ke anĝelo de Dio gravedigis ŝin? Povas ja okazi, ke kiu ajn sin ŝajnigis anĝelo de l' Sinjoro kaj ŝin trompis». Kiam tion li diris, li ploris kaj diris: «Kun kia vizaĝo mi iru al la templo de l' Sinjoro? Kun kiu rigardo mi vizitu la pastrojn de Dio? Kion mi faru?» Kaj tion dirante, li pripensis sin kaŝi kaj forsendi ŝin[11].

XI.

Kaj kiam li ordonis nokte leviĝi kaj fuĝi por ekloĝi ie kaŝe, jen tiunokte aperis al li ensonĝe anĝelo de l' Sinjoro dirante: «Jozef, filo de David, ne timu akcepti Marian kiel vian edzinon, ĉar kio estas en ŝia utero, estas de l' Sankta Spirito. Ŝi naskos filon, kiu nomiĝos Jesuo: tiu ja savos sian

---

[11] Komparu kun Mateo 1:19.

popolon de iliaj pekoj[12]». Jozef leviĝis el sia dormo, kaj dankis al sia Dio, kaj parolis al Maria pri la virgulinoj, kiuj estis kun ŝi, kaj rakontis sian vizion. Kaj pri Maria li estis plene senpezigita, kaj li diris: «Mi pekis, ĉar mi havis iom da suspekto pri vi».

XII.

1 Okazis post tio, ke ekiris onidiro pri Maria, ke ŝi gravedas. Kaptite de la servistoj de l' templo Jozef estis kondukita al la pastro, kiu kune kun la ĉefpastroj komencis mallaŭdi lin per tiaj diroj: «Kial vi trompe misuzis la nuptan rajton de tia virgulino, kiun la anĝeloj de Dio kvazaŭ kolombon nutris en la templo, kiu neniam viron volis eĉ ekkoni, kiu en la leĝo de Dio la plej bonan edukon ricevis? Se vi al ŝi ne estus farinta perforton, hodiaŭ ŝi ankoraŭ restus virgulino». Sed Jozef priĵuris, ke ŝin neniam li eĉ ektuŝis. Abiatar la pastro diris al li: «Vivas Dio, ĉar hodiaŭ mi igos vin trinki la akvon de l' trinkaĵo de l' Sinjoro, kaj via peko tuj montriĝos».

2 Tiam tuj la tuta amaso de Izrael kuniĝis, kiu ne povis kalkuliĝi, kaj alkondukiĝis ankaŭ Maria al la templo de l' Sinjoro. La pastroj kaj ŝiaj gepatroj kaj familianoj plorante diris al Maria: «Konfesu al la pastroj vian pekon, vi kiu estis kvazaŭ kolombo en la templo de Dio kaj ricevis vian nutraĵon el la mano de anĝelo». Sed ankaŭ Jozef estis vokita al la altaro, kaj oni donis al li la akvon de trinkaĵo de l' Sinjoro: se ĝin iu gustumas, kiu mensogas, kaj sepfoje ĉirkaŭiras la altaron, Dio donas ian signon en lia vizaĝo[13]. Kiam Jozef sekure trinkis kaj ĉirkaŭis la altaron, neniu signo de peko aperis en li. Tiam lin deklaris senkulpa ĉiuj pastroj, servistoj kaj la tuta popolo dirante: «Benata vi estas, ĉar en vi neniu peko estis trovita».

3 Kaj ili vokis Marian kaj diris al ŝi: «Vi, kian senkulpigon vi povas havi? Aŭ kia pli granda signo aperis en vi ol tio, kio aperis en via ventro? Nur tion mi demandas de vi, ke, ĉar Jozef estas pura de vi, vi konfesu, kiu estas, kiu trompis vin. Ĉar estas ja pli bone, ke vi konfesas mem, ol ke la

---

[12] Komparu kun Mateo 1:20-21.

[13] Komparu kun Nombroj 5:11 k.s.

kolero de Dio farante signon meze de l' popolo, stigmatu vin». Tiam Maria konstante kaj senhezite diris: «Se estas en mi ia malpuro aŭ alia peko, aŭ estis en mi ia deziro aŭ malĉasto, la Sinjoro antaŭ ĉiuj popoloj malkaŝu ĝin, por ke antaŭ ĉiuj mi estu ekzemplo de plibonigo». Kaj plenkonfide ŝi aliris al la altaro de l' Sinjoro kaj trinkis la akvon de l' trinkaĵo kaj sepfoje ŝi ĉirkaŭiris la altaron, kaj en ŝi neniu malpuro estis trovita.

4 Kaj dum la tuta popolo estis konfuzita kaj dubis, vidante ke ŝi ricevis en la utero, kaj ke en ŝia vizaĝo aperis neniu signo, la popoloj komencis inter si variaparole konfuziĝi. Kelkaj parolis pri ŝia sankteco, sed aliaj male kulpigis ŝin pri malbona konscienco. Tiam, vidante la dubon de l' popolo, ke ŝi do ne tute estis purigita, laŭtavoĉe dum ĉiuj aŭskultis, Maria diris: «Vivas la Sinjoro Adonaj de l' Armeoj, antaŭ kiu mi staras: viron neniam mi ekkonis, kaj ne intencas ekkoni, ĉar dejunaĝe tion en mia menso mi decidis. Tion al mia Dio mi ĵuris de mia infanaĝo, ke al tiu, kiu min kreis, mi restos senmakula, ĉe kio mi konfidas vivi nur por Li sen ajna malpuriĝo».

5 Tiam ĉiuj kisis ŝin, petante ke ŝi pardonu iliajn malbonajn pensojn. Kaj al ŝia domo kondukis ŝin ĉiuj popoloj[14] kaj pastroj kaj ĉiuj virgulinoj kun jubilo kaj ĝojo, vokante kaj dirante: «La nomo de l' Sinjoro estu benata, kiu manifestis sian sanktecon al la tuta popolo Izrael».

XIII.

1 Sed okazis post iom da tempo, ke eliris ordono per edikto de Cezaro Aŭgusto, ke registriĝu ĉiu en sia patrujo[15]. Ĉi tiu registriĝo estis realigita de Kirenio, reganto de Sirio. Necese estis, ke Jozef kun Maria foriru al Betlehem, ĉar de tie li devenis, kaj Maria estis de l' tribo Juda kaj de l' domo kaj patrujo de David. Dum Jozef kaj Maria iris sur la vojo, kiu kondukas al Betlehem, Maria diris al Jozef: «Du popolojn mi vidas antaŭ mi, unu kiu ploras kaj unu kiu ĝojas». Al ŝi respondis Jozef: «Sidu bone

---

[14] Troigita esprimo.

[15] Devas esti devenloko de l' familio.

kaj firme tenu vin sur via ŝarĝbesto, kaj ne senutile parolu». Tiam aperis antaŭ ili belega knabo, vestita en mirindaj vestaĵoj, kaj li diris al Jozef: «Kial vi diris, ke superfluaj estas la vortoj pri la du popoloj, pri kiuj parolis Maria? Ŝi ja vidis la popolon de la Judoj plori, ĉar ĝi retiriĝis de sia Dio, kaj la popolon de l' gojoj ĝoji, ĉar ĝi aliris kaj fariĝis proksima al la Sinjoro, laŭ tio kion promesis al niaj patroj Abraham, Izaak kaj Jakob; ĉar venis la tempo, ke en la semo de Abraham la beno disdoniĝos al ĉiuj gentoj».

2 Kiam tion li diris, la anĝelo ordonis al la ŝarĝbesto halti, ĉar alvenis la tempo por naski; kaj Marian li ordonis descendi de l' besto kaj eniri en subteran groton, en kiu neniam estis lumo sed ĉiam mallumo, ĉar taglumo tie ne havis aliron. Sed en la momento kiam Maria eniris, la groto komencis verŝiĝi de brilado kaj kvazaŭ la suno estus tie, tiel tuta ĝi montris la briladon de l' lumo; kaj kvazaŭ estus tie la sesa horo de l' tago, tiel komplete prilumis tiun groton la Dia lumo; nek tage, nek nokte la Dia lumo mankis, dum Maria estis tie. Kaj ŝi tie naskis virseksan infanon, kiun ĉe la naskiĝo ĉirkaŭis anĝeloj kaj postnaske ili adoris lin, dirante: «Gloro en la alto al Dio kaj surtere paco al la homoj de bona volo».

3 Intertempe Jozef jam serĉadis obstetrikistinon. Kiam al la groto li revenis, Maria jam naskis la infaneton. Kaj diris Jozef al Maria: «Mi alportas al vi la obstetrikistinojn Zelomi kaj Saloma, kiuj ekstere antaŭ la groto staras kaj pro la troa brilado ne kuraĝas eniri». Kiam tion aŭdis Maria, ŝi subridis. Jozef diris al ŝi: «Ne subridu, sed estu atenta, ĉar aliel eble al vi medicino mankos». Tiam ŝi ordonis enkonduki unu al si. Kiam Zelomi envenis, ŝi diris al Maria: «Permesu ke mi vin tuŝu». Kaj Maria permesis tuŝi ŝin, kaj laŭtavoĉe la obstetrikistino ekkriis: «Sinjoro, Sinjoro, kompatu! Neniam ĉi tio estis aŭdita kaj iu ajn suspektis tion, ke la mamoj estas plenaj de lakto kaj virseksulo naskiĝis kaj sian patrinon montras virga. Neniu sanĝo verŝiĝis ĉe la nasko, neniu doloro estis en la naskantino. Virgulino koncipis, virgulino naskis, virgulino restis».

4 Kiam aŭdis tiun voĉon la alia obstetrikistino, Saloma laŭnome, diris: «Kion mi aŭdas, mi ne kredos, se mi ne elprovos mem». Kaj Saloma eniris kaj diris al Maria: «Permesu, ke mi palpu vin por konstati, ĉu Zelomi diras veron». Kiam Maria permesis, ke ŝi palpu, Saloma elstreĉis

sian manon. Kaj kiam ŝi elstreĉis ĝin kaj palpis ŝin, tuj rigidiĝis ŝia mano, kaj pro doloro ŝi komencis laŭtege plori kaj malesperi kaj kriis: «Ho Sinjoro, vi scias, ke ĉiam mi timis vin, kaj ĉiujn malriĉulojn sen repago mi ĉiam prizorgis, de vidvino aŭ orfo nenion mi akceptis, kaj senhavulon neniam sen helpo mi lasis foriri de mi. Kaj jen malfeliĉa mi fariĝis pro mia nekredo, ĉar vian virgulinon mi kuraĝis elprovi».

5 Kiam tion ĉi ŝi diris, apud ŝi aperis junulo tre brila, kiu diris al ŝi: «Proksimiĝu al la infano kaj adoru lin kaj tuŝu lin per via mano, ĉar li savos vin, ĉar mem li estas la Savanto de l' mondo, kaj de ĉiuj kiuj esperas lin». Tuj ŝi aliris al la infano, kaj adorante lin ŝi tuŝis la fibrojn de liaj vindaĵoj, en kiuj la infano estis volvita, kaj sanita tuj estis ŝia mano. Kaj elirante eksteren, ŝi komencis krii kaj eldiri la grandaĵojn de l' mirakloj, kiujn ŝi vidis, kaj kiuj okazis, kaj kiel ŝi estis sanigita, tiel ke multaj pro ŝia predikadp fariĝis kredantoj.

6 Ĉar ankaŭ la paŝtistoj de l' ŝafoj asertis, ke anĝelojn ili vidis meze de l' nokto, kiuj diris himnojn, laŭdante la Dion de l' ĉielo kaj benante lin, dirante ke naskiĝis la Savanto de ĉiuj, kiu estas Kristo la Sinjoro, en kiu restariĝos la savo de Izrael[16].

7 Sed ankaŭ giganta stelo tiuvespere brilis ĝis la mateno super la groto, kies grandeco neniam estis vidita de la komenco de l' mondo[17]. Kaj la profetoj, kiuj estis en Jerusalem, diris, ke tiu stelo indikas la naskiĝon de Kristo, kiu restarigus la promeson ne nur por Izrael, sed ankaŭ por ĉiuj popoloj.

XIV.

Sed la trian tagon de l' naskiĝo de l' Sinjoro Maria eliris el la groto, kaj ŝi eniris en stalon kaj metis la knabon en trogon, kaj bovino kaj azeno adoris lin. Tiam plenumiĝis, kio estis dirita de la profeto Jesaja, kiu diris: «La bovino konas sian posedanton kaj la azeno la trogon de sia

---

[16] Komparu kun Luko 2,8-11.

[17] Ne estas la stelo de l' magoj, kvankam tre similas.

sinjoro[18]». Sed kiam tiuj bestoj havis lin en sia mezo, ili senĉese adoris lin. Tiam realiĝis, kio estis dirita de la profeto Ĥabakuk, kiam li diris: «Meze de du bestoj li estis ekkonita[19]». En la sama loko restis Jozef kaj Maria tri tagojn kun la infano.

XV.

1 La sesan tagon ili eniris en Betlehem, kie la sepan tagon ili kompletigis. Sed la okan tagon ili cirkumcidigis la knabon. Li ricevis la nomon Jesuo, kiun diris la anĝelo antaŭ ol li koncipiĝis en la ventro. Sed kiam finiĝis la tagoj de l' puriĝo de Maria, laŭ la leĝo de Moseo, tiam Jozef portis la knabon al la templo de l' Sinjoro. Kiam la infano estis cirkumcidita, ili oferis pro li paron de turtoj kaj du junajn kolombinojn[20].

2 Estis tamen en la templo iu homo de Dio, perfekta kaj justa, laŭnome Simeon, cent kaj dek du jarojn aĝa. De l' Sinjoro li ricevis la promeson, ke la morton li ne gustumos antaŭ ol la Kriston, la Filon de Dio, li vidis en la karno. Kiam tiu do vidis la infanon, laŭtavoĉe li ekkriis: «Vizitis la Sinjoro sian popolon, kaj la Sinjoro plenumis sian promeson». Kaj alrapidinte li adoris la infanon. Kaj post tio li akceptis lin en sia paliumo[21] kaj denove adoris lin kaj liajn plandojn li kisis kaj diris: «Nun vi ellasas vian servanton, Sinjoro, laŭ via diro, en paco, ĉar miaj okuloj vidis vian savon, kiun vi preparis antaŭ la vizaĝo de ĉiuj popoloj, lumon por malkaŝo al la gentoj, kaj gloron de via popolo Izrael»[22].

3 Estis en la templo de l' Sinjoro ankaŭ la profetino Anna, filino de Fanuel el la tribo Aŝer, kiu loĝis kun sia edzo sep jarojn de post sia virgeco; vidvino ŝi jam estis okdek kvar jarojn; neniam ŝi foriris de la

---

[18] Jesaja 1:3.

[19] Komparu kun Ĥabakuk 3:2. La Vulgato sekvis la malnovan Grekan tradukon de LXX.

[20] Komparu kun Luko 2:21 k.s.

[21] Tipe Romia vestaĵo!

[22] Luko 2:29-32.

templo de l' Sinjoro, nur okupata pri fastado kaj preĝado. Ŝi aliris kaj adoris la infanon, dirante ke en li estas la savo de l' mondo.

XVI.

1 Kiam pasis la dua jaro, venis magoj el oriento[23] al Jerusalem, kiuj kunportis grandajn donacojn. Ili tuj pridemandis la Judojn, dirante: «Kie estas la reĝo kiu naskiĝis al vi? Ni ja vidis lian stelon en oriento, kaj ni venis por adori lin». Tiu ĉi novaĵo atingis la reĝon Herodo, kaj ĝi tiel teruris lin, ke al la skribistoj, al la fariseoj kaj la doktoroj de l' popolo li sendis, por sciiĝi de ili kie la profetoj antaŭdiris, ke naskiĝos la Kristo. Ili diris: «En Betlehem de Juda. Ĉar tiel estas skribite: «Kaj vi, Betlehem, lando de Juda, neniel estas la plej eta el la ĉefoj de Juda; ĉar el vi eliros la gvidanto, kiu regos mian popolon Izrael». Tiam la reĝo Herodo vokis al si la magojn kaj plej insiste pridemandis ilin, kiam al ili aperis la stelo. Kaj li sendis ilin al Betlehem, dirante: «Iru, kaj plej atente informiĝu pri tiu knabo; kaj kiam vi trovos lin, raportu al mi, por ke mi iru adori lin».

2 Kiam la magoj eliris sur la strato, aperis al ili stelo, kaj kvazaŭ por gvidi ilin, ĝi antaŭiris ilin, ĝis ili atingis la lokon, kie estis la infano. Kiam la magoj vidis la stelon, ili tre ĝojis per granda ĝojo, kaj eniris la domon, kaj trovis la infanon Jesuo, kiu sidis sur la sino de l' patrino. Tiam ili malpakis siajn trezorojn, kaj per grandegaj donacoj ili pridonacis Marian kaj Jozefon. Al la infano mem tamen ili prezentis ĉiuj unuope orajn monerojn. Fine la unua prezentis oron, la dua incenson, la tria mirhon. Kiam poste ili volis reiri al la reĝo Herodo, en sonĝo ili estis avertitaj de anĝelo, ke ili ne reiru al Herodo. Ili tamen adoris la infanon kun ĉia ĝojo kaj per alia vojo reiris al sia regiono.

XVII.

1 Kiam la reĝo Herodo komprenis, ke la magoj lin trompis, lia koro ekflamis, kaj tra ĉiuj stratoj li sendis homojn por kapti ilin kaj mortigi. Kiam finfine ilin li ne povis trovi, li sendis al Betlehem kaj mortigis ĉiujn

---

[23] La manuskriptoj varias: foje post du tagoj, foje post du jaroj, foje je la dektria tago.

knabetojn de du jaroj aŭ malpli, konforme la tempon, kiun li sciiĝis de la magoj.

2 Sed unu tagon antaŭ ol tio okazis, Jozef ricevis en sonĝo averton de anĝelo de l' Sinjoro, kiu diris al li: «Prenu Marian kaj la infanon, kaj tra la dezerto iru al Egiptujo». Jozef do iris laŭ la averto de l' anĝelo.

XVIII.

1 Kiam ili atingis iun groton, en kiu ili volis ripozi, Maria descendis de l' ŝarĝbesto kaj tenis Jesuon sur sia sino. Estis kun Jozef tri knaboj kaj kun Maria unu knabino, kiuj kunvojaĝis. Jen subite tri drakoj aperis el la groto, kaj kiam la knaboj tiujn vidis, ili pro teruro ekkriis. Sed Jesuo descendis de l' sino de sia patrino, kaj sur siaj piedetoj staris antaŭ la drakoj; sed tiuj adoris lin, kaj post adorado foriris. Tiam realiĝis kio estis dirita de la profeto David, kiam tiu diris: «Laŭdu la Sinjoron el la lando de drakoj, marmonstroj kaj ĉiuj abismoj[24].

2 Sed la infaneto Jesuo iris antaŭ ili kaj instruis ilin, ke al neniu homo ili nocu. Sed Maria kaj Jozef tre timis, ke eble la infaneto estu lezita de l' drakoj. Sed Jesuo diris al ili: «Ne timu, kaj ne konsideru min kvazaŭ infaneto mi estus: mi ja ĉiam estis viro perfekta kaj estas, kaj necese estas ke ĉiuj sovaĝaj bestoj de l' arbaroj antaŭ mi fariĝu obeemaj».

XIX.

1 Sammaniere adoris lin leonoj kaj leopardoj kaj akompanis ilin en la dezerto; kien ajn iris Maria kaj Jozef, vojmontrante ili antaŭiris, kaj klinante siajn kapojn, ili adoris Jesuon. Sed la unuan tagon, kiam Maria vidis la leonojn veni ĉirkaŭ ŝi kaj diversajn specojn de bestoj, ŝi terure ektimis. La infano Jesuo ĝojvizaĝe rigardante al ŝi, diris: «Ne timu, panjo: ili ja ne hastas por maljuste trakti vin sed por obei vin». Per ĉi diroj li forigis la timon de iliaj koroj.

2 Sed la leonoj promenis kun ili kaj kun la bovinoj, azenoj kaj ŝarĝbestoj, kiuj portis ĉiujn necesaĵojn. Kaj neniun ili traktis malbone, sed ili estis

---

[24] Psalmo 148:7 – variaĵo.

afablaj al la ŝafoj kaj bokoj, kiujn el Judajo ili kunportis kaj tenis ĉe si. Inter lupoj ili promenis kaj nenion timis, kaj neniu estis vundita de iu alia. Tiam plenumiĝis, kio estas dirita de profeto: «Lupoj paŝtiĝos kun ŝafoj, leono kaj bovino kune sin nutros per pajlo»[25]. Efektive estis du bovinoj kaj unu ĉaro, en kiu ĉiujn necesaĵojn ili transportis, kiujn direktis la leonoj en ilia vojaĝado.

XX.

1 Okazis tamen en la tria tago post sia foriro, ke Maria en la dezerto laciĝis pro la troa sunbrilo; kiam palmon ŝi vidis, ŝi diris al Jozef: «Mi ripozu mallonge sub ties ombro». Sed Jozef haste kondukis ŝin al la palmo kaj igis ŝin descendi de l' ŝarĝbesto. Kiam Maria supren rigardis al la supro de l' palmo, ŝi vidis ĝi plenas je fruktoj, kaj ŝi diris al Jozef: «Mi ŝatus, se eblas, ricevi el la fruktoj de tiu palmo». Kaj Jozef diris al ŝi: «Mi miras, ke tion vi diras, ĉar vi ja vidas, kiel alta estas tiu palmo, kaj vi ja pensas manĝi de l' fruktoj de tiu palmo. Mi pli pensas pri nia manko de akvo, kiu en la akvosakoj mankas, kaj ni ne scias, de kie por ni kaj la bestoj tiujn ni povos ree plenigi».

2 Tiam la infaneto Jesuo ĝojmiene sidante sur la sino de l' patrino, diris al la palmo: «Flektu vin, arbo, kaj nutru mian patrinon el viaj fruktoj». Kaj tuj, ĉe tiu diro, la palmo kliniĝis ĝis la plandoj de Maria, kaj ili kolektis de ĝi fruktojn, per kiuj ili ĉiuj satiĝis. Sed kiam ĉiuj ĝiaj fruktoj estis rikoltitaj, ĝi plu staris klinita, atendante ĝis laŭ nova ordono ĝi ree supreniĝu. Tiam Jesuo diris: «Ree leviĝu, palmo, kaj rekomfortiĝu, por ke egalulo vi estu inter miaj arboj, kiuj estas en la paradizo de mia Patro. Sed malfermu el viaj radikoj la vejnon, kiu estas kaŝita en la tero, kaj el ĝi fluu la akvoj por satigi nin». Kaj tuj rektiĝis la palmo, kaj el ĝiaj radikoj komencis elŝpruci akvofontoj plej brilaj, malvarmaj kaj treege dolĉaj. Vidante tiujn akvofontojn, ili ege ekĝojis, kaj ili satiĝis kune kun ĉiuj bestoj kaj homoj, dankante al Dio.

---

[25] Jesaja 65:25.

XXI.

Sekvatage tamen ili foriris de tie, kaj en la momento kiam ili ekiris, Jesuo sin turnis al la palmo kaj diris: «Tiun privilegion mi donas al vi, palmo, ke de miaj anĝeloj unu el viaj branĉoj estu transportata kaj estu plantita en la paradizo de mia Patro. Tiun benon tamen mi donos al vi, ke, kiu en ia ajn batalo venkas, estu dirate al li: «Vi venis al la palmo de l' venko». Kiam tion li diris, jen anĝelo de l' Sinjoro aperis starante super la palmo, kaj forprenante unu el ĝiaj branĉoj, li flugis ĉielen, kun la branĉo en la mano. Kiam tion ili vidis, ili falis vizaĝalteren kaj fariĝis kvazaŭ mortintoj. Sed Jesuo diris al ili: «Kial timo ekprenis viajn korojn? Aŭ ĉu vi ne scias, ke la palmo, kiun mi igis transporti al la paradizo, staros preta por ĉiuj sanktuloj en lokoj de ĝuoj, same kiel ĝi preta staris por vi ĉiuj en ĉi dezerto?» Sed plenigitaj de ĝojo ili ĉiuj restariĝis.

XXII.

1 Dum ili vojaĝis, Jozef diris al li: «Sinjoro, la troa varmo nin kuiras: se plaĉas al vi, ni prenu vojon apud la maro, kaj ni povos ripozante tra apudmaraj urbetoj senprobleme vojaĝi». Jesuo diris al li: «Ne timu, Jozef; mi mallongigos por vi la vojon, por ke kio estus vojaĝo de tridek tagoj, vi elfinu en ĉi unu sola tago». Dum tion ili estis parolantaj, jen ili ekvidis jam la montojn de Egiptujo kaj ĝiajn urbojn.

2 Kaj gojaj kaj jubilante ili atingis la regionon de Hermopolo; kaj ĉar tie estis neniu konato, ĉe kiu ili povus gasti, ili eniris templon, kiu nomiĝis la Kapitolo de Egiptujo. En tiu templo tricent sesdek kvin idoloj estis starigitaj, al kiuj ĉiutage oni prezentis sakrilegie Diajn honorojn.

XXIII.

Okazis, kiam la plej benata Maria estis enirinta la templon kun la infano, ke ĉiuj idoloj falis teren vizaĝantaŭen, tiel ke ĉiuj frakasiĝis komplete; kaj tiel ili montris, ke evidente ili estas nenio. Tiel plenumiĝis, kio estis dirita

de la profeto Jesaja: «Jen la Sinjoro veturos sur malpeza nubo kaj eniros Egiptujon, kaj ektremos antaŭ li ĉiuj manfaritaj idoloj de l' Egiptoj[26]».

XXIV.

Kiam al Afrodisio, la estro de tiu urbo, tiel estis raportite, kun sia tuta armeo li venis al la templo. Sed kiam la ĉefpastroj de l' templo vidis, ke Afrodisio kun sia tuta armeo hastas al la templo, ili kredis, ke ilin trafos puno, ĉar pro ili ĉiuj Dioj disfalis. Sed li eniris la templon, kaj kiam li vidis, ke ĉiuj idoloj kuŝas vizaĝalteren, li iris al Maria kaj adoris la infanon, kiun ŝi ĉe la sino portis, kaj kiam tiun li adoris, li alparolis sian tutan armeon kaj siajn amikojn, dirante: «Se tiu ne estus la Dio de ĉiuj niaj Dioj, niaj Dioj certe ne estus falintaj antaŭ Li vizaĝalteren, kaj nun ne tiel kuŝus antaŭ Li: tial senvorte ili Lin atestas kiel ilian Dion. Sed kion niajn Diojn ni vidas fari, se ni ne ĉiuj farus la samon, ni povus riski renkonti Lian koleron kaj ĉiuj trafi en nian pereon, kiel okazis al Faraono, la reĝo de l' Egiptoj, kiu ne kredante je tiom da mirakloj kun sia tuta armeo pereis en la maro». Tiam la tuta popolo de tiu urbo kredis je la Sinjoro Dio per Jesuo Kristo.

---

[26] Jesaja 19:1.

Dua Parto

XXV.

Ne longe poste anĝelo diris al Jozef: «Reiru al la lando de Juda; ja mortis, kiuj serĉis la vivon de la knabo».

XXVI.

1 Okazis, ke post la reveno de Jesuo el Egiptujo, kiam li estis en Galileo, kiam jam komenciĝis la kvara jaro de lia vivo, unu tagon de sabato, li ludis kun infanoj apud la fluejo de Jordan. Dum tie li sidis, Jesuo porŝerce faris sep lagetojn el ŝlimo, en kiuj ĉiuj li faris sulketojn, tra kiuj el la rivereto la akvon li kondukis al sia lageto kaj ree rekondukis. Tiam unu el tiuj infanoj, filo de diablo, per ĵaluza animo fermis la enirejon, kiu regis la akvojn en la lago, kaj neniigis, kion Jesuo konstruis. Tiam Jesuo diris: «Ve vi, filo de l' morto, filo de Satano. La verkon, kiun mi faris, ĉu vi detruas?» kaj tuj la infano kiu tion faris, mortis.

2 La parencoj de l' mortinto kolerege protestis kontraŭ Maria kaj Jozef, dirante al ili: «Via filo malbenis nian filon, kaj li mortis». Kiam Jozef kaj Maria tion aŭdis, ili tuj iris al Jesuo pro la tumulto de la parencoj de l' knabo kaj la amasiĝo de la Judoj. Sed Jozef diris sekrete al Maria: «Mi ne kuraĝas ion diri al li; sed vi, admonu lin kaj diru: «Kial la malamon de l' popolo vi incitis kontraŭ ni, kaj ni eltenu la ĝenan malamon de la homoj?» kaj kiam lia patrino venis al li, ŝi demandis lin: «Mia Sinjoro, kion li misfaris, ke li mortu?» sed li diris: «La morton li meritis, ĉar miajn laborojn, kiujn mi faris, li dismetis».

3 Admonis lin do lia patrino: «Ne faru tion, mia Sinjoro, ĉar ĉiuj leviĝas kontraŭ ni». Sed li ne volis tristigi sian patrinon, per la dekstra piedo li do batis la pugon de l' mortinto, kaj diris al li: «Leviĝu, filo de l' malbono; ĉar vi ne indas eniri en la ripozon de mia patro, ĉar vi disbatis la verkojn, kiujn mi estis farinta». Tiam tiu kiu mortis, releviĝis kaj malaperis. Sed Jesuo, kun propra mandato, plu konstruadis kanalojn por konduki la akvon en la lagetoj.

XXVII.

Okazis, ke Jesuo post ĉi tio, dum ĉiuj ĝin vidis, prenis argilon el la lagetoj, kiujn li faris, kaj el ĝi dek du paserojn li modlis. Estis sabato, kiam Jesuo tion faris, kaj kun li estis pluraj infanoj. Kiam tamen unu el la Judoj rimarkis, ke tion li faras, li diris al Jozef: «Jozef, ĉu la infanon Jesuo vi ne vidas labori en sabato, kio ja ne licas? El argilo li ja faris dek du paserojn». Kiam Jozef tion aŭdis, li grumblis dirante: «En sabato ĉu vi faras, kion fari ne licas?» Jesuo aŭdis Jozefon tion diri, interfrapis siajn manojn kaj diris al la paseroj: «Flugu!» Je la sono de lia ordono ĉiuj komencis flugi. Kaj dum ĉiuj tie staris, ĝin vidis kaj aŭdis, li diris al la birdoj: «Flugu tra la tuta mondo – kaj vivu!». Kiam tiajn signojn vidis la ĉeestantoj, ili pleniĝis je granda mirado. Kelkaj laŭdis kaj admiris lin; aliaj tamen riproĉis lin. Kaj kelkaj foriris al la ĉefaj pastroj kaj al la plej gravaj fariseoj kaj informis tiujn, kiajn grandaĵojn kaj signojn antaŭ la okuloj de la tuta popolo de Izrael faris la infano Jesuo, la filo de Jozef. Kaj tio ĉi estis raportita al la dek du triboj de Izrael.

XXVIII.

Jen ree la filo de Annas, la pastro de l' templo; kun Jozef li alvenis, bastonon tenante en la mano, kaj dum ĉiuj rigardis en terura kolero li disbatis la lagetojn, kiujn konstruis Jesuo. Kaj el ili la akvon li defluigis, kiun tiu en ili estis kolektinta. Ĉar ankaŭ la akvodukton mem, per kiu envenis la akvo, li fermis kaj poste neniigis. Kiam Jesuo tion vidis, li diris al la knabo, kiu forfluigis la akvon el siaj lagetoj: «Ho semo plej fia de malbono, ho filo de l' morto, laborilo de Satano! La frukto de via posteularo vere estos senforta, kaj viaj radikoj sensukaj, viaj branĉoj sekaj, sen ia ajn frukto». Kaj dum ĉiuj spektis tiu knabo tuj sekiĝis kaj mortis.

XXIX.

Poste Jozef tim-tremis kaj tenis Jesuon hejme, kaj li enŝlosis lin en sia domo, kaj lia patrino estis kun li. Kaj jen subite de la kontraŭa flanko[27] venis knabo, ankaŭ li malbonulo, kiu alrapidis kaj kontuziĝis kontraŭ ŝultro de Jesuo, celante ĝeni lin kaj se eble noci. Sed Jesuo diris al li: «Vi ne sana revenos de la vojo, kiun nun vi iras». Kaj tuj li ekkuris kaj falis morta. Kaj la parencoj de l' mortinta ekkriis, ĉar ili vidis, kio okazis: «De kie naskiĝis tiu infano? Manifeste estas, ke ĉiu vorto, kiun li diras, estas vera, kaj ofte eĉ antaŭ ol li eldiras ĝin, ĝi realiĝas». Kaj la gepatroj de l' mortinta knabo venis al Jozef kaj diris al li: «Forigu tiun Jesuon de ĉi loko; vi ja ne povos loĝi ĉi tie kun ni. Aŭ minimume instruu lin beni kaj ne malbeni». Jozef iris al Jesuo kaj admonis lin per la vortoj: «Kial tion vi faras? Multaj jam suferas de vi, kaj pro vi ili malamas nin, kaj pro vi ni devas elteni insultojn de l' homoj». Responde Jesuo diris al Jozef: «Neniu filo estas saĝa, krom se lia patro edukis lin laŭ la scio de ĉi mondo, kaj la malbeno de l' patro nocas al neniu krom al malbone agantoj». Tiam ili amasiĝis kontraŭ Jesuo kaj kulpigis lin ĉe Jozef. Kiam tion vidis Jozef, li ege teruriĝis, timante perforton kaj insurekcion en la popolo Izrael. La saman horon Jesuo ekkaptis la mortintan infanon je la orelo kaj pendigis lin en la aero en ĉies vido, kaj ili vidis Jesuon paroli kun li kvazaŭ patro kun filo. Kaj lia spirito revenis en lin, kaj li reviviĝis. Kaj ĉiuj miregis.

XXX.

1 Certa Juda instruisto, Zakĥajo laŭnome, aŭdis Jesuon eldiri tiajn dirojn, kaj vidante, ke en li estas ne superebla scio de la virto, li fariĝis malsana kaj komencis senzorge kaj stulte kaj sentime paroli kontraŭ Jozef. Kaj li diris: «Ĉu vi ne volas prezenti vian filon, ke oni instruu al li pri homa scienco kaj timo? Sed mi vidas, ke vi kaj Maria volas ami vian filon pli ol la tradiciojn de l' pliaĝuloj de la popolo. Necesis ja, ke vi pli honoru la

---

[27] Neklare de kie.

pastrojn de l' tuta eklezio[28] de Izrael, kaj ke kun la infanoj li havu reciprokan amon kaj ke inter ili li edukiĝu laŭ la Juda doktrino».

2 Al li kontraŭdiris Jozef: «Kaj kiu povas regi kaj instrui tiun infanon? Sed se vi povas regi kaj instrui lin, niaparte ni ne vidas problemon, ke de vi li lernu kion instruas la homoj». Kiam Jesuo aŭdis, kion diris Zakĥajo, li respondis al li: «Instruisto de la leĝo: kion ĵus antaŭe vi diris kaj ĉio, kion vi menciis, devas esti sekvataj de tiuj, kiuj estas instruataj de homaj institucioj; sed eksterulo mi estas de viaj instruoj, ĉar karnan patron mi ne havas. Vi kiu estas instruisto de la leĝo, vi restas en la leĝo; sed mi estis antaŭ la leĝo. Sed dum vi kredas ke egalulon en la scienco vi ne havas, mi instruos vin, ĉar neniu alia krom mi povas instrui kion vi menciis. Nur kiu estas inda, povas tion fari. Sed kiam mi estos levita de la tero, tiam mi igas ĉesi tutan mencion pri via genealogio. Vi ne scias, kiam vi naskiĝis; nur mi sola scias, kiam vi estis naskitaj, kaj kiel longe daŭros via vivo surtera».

3 Ĉiuj, kiuj aŭdis diskonigi tiujn ĉi dirojn, miris kaj ekkriis: «Ho, ho, ho, tio estas mirinde granda kaj mistero giganta. Neniam de iu alia oni ĝin aŭdis, nek de l' profetoj, nek de l' fariseoj, nek de l' instruistoj de la leĝo io tia estis aŭdita. Pri tiu ni scias, de kie li naskiĝis, kaj li estas apenaŭ kvin jarojn aĝa, sed de kie li havas tiujn dirojn?» La fariseoj respondis: «Neniam tiajn dirojn ni aŭdis de infano tiel juna».

4 Jesuo respondis al ili: «Ĉe tio ĉu vi miras, ke infano ĝin diras? Kial min vi ne kredas, kiu tion al vi diras? Kaj ĉar mi diris, ke mi scias, kiam vi estis naskitaj, vi ĉiuj miras: multe pli mi diros al vi, ke multe pli vi miru. Abraham, kiun vi nomas via patro, – lin mi vidis kaj kun li mi parolis, kaj li min vidis[29]». Kiam tion ili aŭdis, ili mutiĝis, kaj neniu el ili ankoraŭ kuraĝis ion diri. Kaj Jesuo diris al ili: «Mi estis inter vi kun la infanoj, sed vi ne rekonis min. Mi parolis al vi kvazaŭ al saĝuloj, kaj mian voĉon vi ne rekonis, ĉar pli malgrandaj vi estas kaj pli et-fidaj».

---

[28] Indiko, kiel malmulte sciis la aŭtoro pri Izrael.

[29] Komparu kun Joh 8:56.58.

XXXI.

1 Denove diris Zakĥajo, la doktoro de l' leĝo, al Jozef kaj Maria: «Donu al mi vian filon, kaj mi konfidos lin al doktoro Levi, kiu instruos al li la literojn kaj edukos lin». Tiam Jozef kaj Maria ĝojplene kondukis Jesuon al la lernejo, por ke la maljunulo Levi instruu lin pri la literoj. Kiam li eniris, li silentis. La doktoro Levi diris al Jesuo unu literon, kaj komencante ĉe la unua litero, la *Alef*, li diris al li: «Respondu». Sed Jesuo silentis kaj respondis nenion. Tiam la instruisto Levi ekkoleris, prenis bastoneton, kaj batis lin sur la kapon.

2 Sed Jesuo diris al la instruisto: «Kial vi batas min? Vere vi ja scias, ke kiu estas batata, pli instruas al tiu, kiu lin batas, ol kion de tiu li estas instruata. Mi ja povas diri al vi, kio de vi mem estas instruata. Sed ĉi tiuj estas ĉiuj blindaj, kiuj diras kaj aŭdas, kvazaŭ bronzo sonanta aŭ cimbalo tintanta, en kiuj ne estas senso pri tio, kio per ilia sono kompreniĝas».

Kaj aldone Jesuo diris kaj Zakĥejo: «Ĉiu litero de *Alef* ĝis *Taŭ* distingiĝas per ilia disponiĝo. Vi unue diru al mi, kio estas *Taŭ* kaj tiam mi diros, kio estas *Alef*». Kaj denove diris al ili Jesuo: «Kiuj ne konas *Alef*, kiel ili povas diri, kio estas *Taŭ*, la hipokrituloj? Diru unue, kio estas *Alef*, kaj tiam mi kredos al vi, kiam *Beth* vi diros». Kaj Jesuo komencis demandadi pri la nomoj de la unuopaj literoj, kaj diris: «La instruisto de la leĝo diru, kio estas la unua litero, aŭ kial ĝi havas multajn triangulojn, gradigitajn, subakutajn, mediatajn, obduktajn, produktajn, stratajn, kurvistratajn». Kiam tion Levi aŭdis, li konfuziĝis pri la dispozicio de tiom da nomoj de literoj[30].

3 Tiam, dum ĉiuj ĝin aŭdis, li komencis krii: «Ĉu tiu devas vivi surtere? Li ja indas grandakruce pendiĝi. Li ja povas estingi la fajron kaj eskapi aliajn turmentojn. Mi ja kredas ke li estas antaŭ la kataklismo, naskita antaŭ la inundo. Kiu utero ja portis lin? Aŭ kiu patrino lin naskis? Aŭ kiuj mamoj laktis lin? Mi fuĝas antaŭ li; mi ja ne kapablas elteni la vorton al lia buŝo, sed mia koro mutiĝas aŭdante tiajn vortojn. Mi kredas, ke

---

[30] La malklareco de ĉi tiuj esprimoj, piednotas mia tekst-eldono, devenas de l' gnostika karaktero de la teksto kaj eble ankaŭ de malzorgo de kopiistoj.

neniu homo povas sekvi lian vorton, krom se Dio estus kun li. Nun mi kompatinda transdonis min por ridindaĵo al li. Ĉar dum mi ja kredis havi disĉiplon, mi trovis mian instruiston, sen ke mi lin konis. Kion mi diru? Mi ne kapablas elteni la vortojn de tiu ĉi knabo: mi jam fuĝos mian taskon, ĉar mi ne kapablas kompreni tion. De infano mi, maljunulo, estis venkita, ĉar nek la komencon de kion li asertas mi povas kompreni, nek la finon. Estas ja malfacile trovi la komencon el si mem. Certe mi diras al vi, mi ne mensogas, ke antaŭ miaj okuloj la agado de tiu knabo kaj la komenco de lia parolado kaj la rezulto de lia intenco ŝajne havas nenion komunan kun la homoj. Li tamen, mi ne scias, ĉu mago aŭ Dio estas; aŭ certege anĝelo de Dio parolas en li. Sed de kie li estas aŭ kio li fariĝos, mi ne scias».

4 Tiam gajavizaĝe ridetante diris Jesuo kun aŭtoritato pri li, dum ĉiuj filoj de Izrael ĉeestis kaj aŭskultis: «La senfruktaj donu fruktojn, kaj la blindaj vidu, lamuloj iradu rekte, malriĉuloj ĝuu bonaĵojn kaj mortintoj reviviĝu[31], por ke ĉiu unuope relevite reviviĝu kaj ke restu en li kiu estas la radiko de l' vivo kaj de eterna dolĉo». Kiam la infano Jesuo tion diris, tuj ĉiuj plagataj de malsanoj restariĝis. Kaj nenion ili plu kuraĝis diri aŭ aŭdi de li.

XXXII.

Post tio foriris de tie Jozef kaj Maria kun Jesuo al la urbo Nazaret; kaj tie li restis kun la gepatroj. Kaj dum tie unu sabaton li estis, Jesuo ludis kun infanoj sur la tegmento de iu domo, kaj okazis, ke unu knabo faligis alian de l' tegmento, kaj tiu mortis. Kiam tion vidis la gepatroj de l' mortinto, ili kriis kontraŭ Jozef kaj Maria: «Via filo puŝis nian filon teren, kaj li mortis». Jesuo tamen silentis kaj diris nenion. Haste Jozef kaj Maria venis al Jesuo. Kaj ŝia patrino demandis: «Mia Sinjoro, diru al mi, ĉu vi puŝis lin teren?» Kaj tuj Jesuo deiris de l' tegmento al la tero kaj vokis la knabon je lia nomo Zeno. Kaj tiu respondis: «Sinjoro». Kaj Jesuo diris al li: «Ĉu mi vin teren puŝis de l' tegmento?» Sed li diris: «Ne, Sinjoro». Kaj

---

[31] Komparu kun Mateo 11:5.

miregis la gepatroj de la knabo mortinta kaj honoris Jesuon pro la farita signo. Kaj Jozef kaj Maria de tie foriris al Jeriĥo.

XXXIII.

Jesuo estis sesjara, kaj lia patrino sendis lin kun akvokruĉo al fonto por ĉerpi akvon kun la infanoj. Kaj okazis, post kiam akvon li ĉerpis, ke unu el la knaboj skuis la akvokruĉon kaj ĝi rompiĝis. Sed Jesuo elstreĉis la paliumon, kiun li portis, kaj en ĝi savis tiom da akvo, kiom estis en la kruĉo, kaj portis tion al sia patrino. Sed ŝi, tion vidante, miris, kaj pripensis, kaj gardis ĉion en sia koro.

XXXIV.

Aliafoje li eliris al la agro kaj prenis el la provizejo de sia patrino iom da tritiko, kaj li mem tion semis. Kaj ĝi naskiĝis kaj kreskis, kaj tre multe plinombriĝis. Kaj fine okazis, ke li mem rikoltis kaj el tio li kolektis tri kor'ojn[32], kaj tion donacis li al siaj konatoj.

XXXV.

Estas vojo, kiu deiras de Jeriĥo kaj iras ĝis la rivero Jordan, kie la filoj de Izrael transiris: tie laŭdire haltis la kesto de la interligo[33]. Jesuo estis ĉirkaŭ okjara kaj eliris el Jeriĥo, kaj iris al Jordan. Kaj iom flanke de la strato, apud la rivero Jordan, estis rabistejo, kie leonino nutris siajn idetojn; kaj tiustrate neniu povis senriske pasi. Sed kiam Jesuo, venante de Jeriĥo, atingis tiun lokon, li rimarkis, ke en tiu groto leonino naskis siajn idetojn, kaj dum ĉiuj tion vidis, li eniris en ĝin. Sed kiam la leonoj vidis Jesuon, ili kuris renkonte al li kaj adoris lin. Kaj Jesuo sidis en la groto, kaj la idetoj de la leonino ĉirkaŭkuris ĉe liaj piedoj, ludante kun li kaj karesante lin. Sed la adoltaj leonoj kurbigis sian kapon, staris iom diste kaj lin adoris, kaj per siaj vostoj ili lin salutis. Tiam diris la popolo, kiu staris diste sen vidi Jesuon: «Se li aŭ liaj patroj ne farus gravajn

---

[32] Juda mezuro, pli malpli po 4 hektolitroj.

[33] Josuo 4:3.7.9.

pekojn, neniam el si mem li sin prezentus al la leonoj». Kaj dum tion ĉi la popolo pripensis inter si kaj ege afliktiĝis, jen subite aperis Jesuo antaŭ la okuloj de l' popolo, kaj la leonoj ludis inter si antaŭ liaj piedoj. Sed la gepatroj de Jesuo staris tie kun kurbita kapo de diste kaj nur rigardis; same la popolo, pro la leonoj, restis diste: ili ankoraŭ ne kuraĝis pli proksimiĝi. Tiam Jesuo komencis paroli al la popolo: «Kiom pli bonaj estas la sovaĝaj bestoj ol vi, ĉar ili rekonas kaj adoras sian Sinjoron, kaj vi homoj, kiuj ja estas formitaj laŭ la bildo kaj aspekto de Dio, vi estas sensciaj. La bestoj rekonas min; la homoj min vidis, kaj ne rekonas».

XXXVI.

Post tio Jesuo transiris la riveron Jordan, dum ĉiuj ĝin vidis kun la leonoj, kaj la akvo de Jordan dividiĝis dekstren en maldekstren[34]. Tiam al la leonoj li diris tiel, ke ĉiuj ĝin aŭdis: «Iru en paco kaj neniun vundu, sed ankaŭ neniu homo vin vundu, ĝis kiam vi returnos de kie vi venis». Sed ili ne voĉe sed korpe adiaŭante reiris al sia lokoj. Jesuo tamen al sia patrino reiris.

XXXVII.

1 Ĉar Jozef estis lignaĵisto kaj nenion produktis el ligno krom jugojn de bovoj kaj plugilojn kaj aliajn ilojn por la agrikulturo, kaj litojn el ligno, okazis ke iu junulo lin petis fabriki kuŝliton de ses ulnoj. Kaj Jozef ordonis al sia knabo elhaki la lignon per fera segilo laŭ la prezentita amplekso. Sed tiu ne sekvis la donitan mezuron; sed unu lignon li faris malpli longa ol la alian. Jozef nervoziĝis kaj pripensis, kion fari pri tio.

2 Kiam Jesuo vidis, ke li tiel ŝvitas, ĉar tio estas nefareblaĵo, li alparolis lin per voĉo konsola kaj diris: «Venu, ni tenu la kapojn de ambaŭ lignoj, kaj kapon al kapo ni kunigu ilin, ni egaligu ilin kaj tiru al ni: ni ilin povos fari egalaj». Tiam Jozef obeis al lia ordono, ĉar li ja sciis, ke li povas fari, kion li volas. Kaj Jozef prenis la kapojn de la lignoj kaj ilin jungis al la muro apud si; kaj Jesuo tenis la aliajn lignojn kaj tiris la malpli longan al

---

[34] 2 Reĝoj 2:8.

si kaj egaligis ĝin al la pli longa[35]. Kaj al Jozef li diris: «Laboru, kaj konstruu, kion vi promesis». Kaj Jozef faris, kion li promesis.

XXXVIII.

1 Tiam duafoje la popolo demandis ĉe Jozef kaj Maria, ĉu Jesuo estu instruata en la lernejo pri literoj. Kiam tion ili ne neis, kaj laŭ ordono de l' pliaĝuloj ili kondukis lin antaŭ la instruiston por ke de tiu li estu instruita en la homa scienco. Kaj tiam la instruisto komencis ordonante instrui lin, dirante: «Diru *Alfa*». Sed Jesuo diris al li: «Unue vi diru al mi, kio estas *Beta*, kaj tiam mi diros al vi, kio estas *Alfa*.» Sed pro tio la instruisto kolera frapis Jesuon, kaj baldaŭ post kiam li frapis lin, li mortis.

2 Jesuo reiris hejmen al sia patrino. Sed Jozef, plena je timo, diris al Maria: «Vi scias, ke mia animo estas morte trista pro ĉi knabeto[36]. Kaj estas ja eble, ke iu en sia malbono vundus tiun knabon, kaj ke li mortus». Sed Maria diris responde: «Viro de Dio, ne kredu, ke tio povos okazi. Tute sekure kredu, ke kiu lin sendis naskiĝi inter la homoj, Tiu lin gardos kontraŭ ĉiuj aĉaĵoj kaj sianome Li defendos lin kontraŭ la malbono».

XXXIX.

1 Denove, triafoje, la Judoj ree vokis Marian kaj Jozefon, por ke per siaj flataĵoj ili konduku lin al la instruado. Pro timo antaŭ la popolo kaj pro la impertinenteco de l' princoj kaj la minacoj de l' pastroj, Jozef kaj Maria denove lin kondukis al la lernejo, sciante, ke neniu, kiu havas la perfektan scion de la sola Dio, ion povas lerni de homo.

2 Sed kiam Jesuo eniris la lernejon, gvidate de l' Sankta Spirito li akceptis la libron el la mano de l' instruisto pri la leĝo, kaj dum la tuta popolo rigardis kaj aŭskultis, li komencis legi, sed ne kio estis skribita en ilia libro, sed en spirito de l' vivanta Dio li parolis, kvazaŭ el la vivanta fonto elirus torento da akvo kaj tiu fonto restis ĉiam plena. Kaj tiel al la popolo

---

[35] Piednoto en mia ekzemplero indikas, ke la frazo lingve ne klaras.

[36] Vidu Mateo 26:38; Marko 14:34.

li instruis kun talento pri la grandaĵoj de l' vivanta Dio, tiel ke la instruisto mem falis teren kaj lin adoris. Sed la koro de l' popolo, kiu tie sidis kaj lin aŭdis rakonti tiaĵojn, turnis en konsterniĝon. Kiam tion aŭdis Jozef, li alkuris al Jesuo, timante ke la instruisto mem mortu. Kiam tion li vidis, la instruisto diris al li: «Vi ne donis disĉiplon al mi sed instruiston: kaj kiu povas elteni ties dirojn?» Tiam plenumiĝis, kio estis dirite de psalmisto: «La rivero de Dio pleniĝis per akvo. Vi preparis ilian panon, ĉar tiel estas lia preparo[37]».

XL.

Post tio Jozef migris de tie kun Maria kaj Jesuo, por ke ili venu al Kafarnaum maritima, pro la malbono de l' homoj, kiuj estis kontraŭ li. Kaj dum Jesuo loĝis en Kafarnaum, en tiu urbo estis homo nomata Jozef, tre riĉa. Sed ronĝita de malsano li mortis, kaj mortinta li kuŝis sur kuŝlito. Sed kiam Jesuo en la urbo aŭdis la ĝemadon, la ploradon kaj la ve-kriojn pri la mortinto, li diris al Jozef: «Kial al li, kiu ja havas la saman nomon kiel vi, vi ne donas la profiton de via samnomeco?» Jozefo respondis al li: «Kio estas mia kapablo aŭ okazo, bonfari al li?» Jesuo diris: «Prenu la ŝvittukon, kiu vin kovras, kaj metu ĝin sur la kapon de l' mortinto, dirante al li: «Kristo vin savu!». Kaj tuj la mortinto estos savita kaj restariĝos de sia kuŝlito». Kiam tion Jozef aŭdis, li tuj laŭ ordono de Jesuo forkuris, eniris la domon de l' mortinto, kaj la ŝvittukon, kiun li havis sur sia kapo, li metis sur la vizaĝon de tiu, kiu kuŝis sur la kuŝlito, kaj diris: «Savu vin Jesuo», kaj tuj restariĝis la mortinto de la lito, kaj demandis, kiu estas Jesuo.

XLI.

1 Kaj ili foriris de la urbo Kafarnaum al la urbo, kiu nomiĝas Betlehem. Kaj Jozef estis kun Maria en sia domo, kaj Jesuo kun ili. Certatage Jozef vokis sian plej aĝan filon Jakob al si kaj sendis lin al la legomĝardeno por kolekti legomojn por prepari manĝi. Kaj Jesuo sekvis sian fraton Jakob

---

[37] Psalmo 65:10.

en la ĝardenon, sed Jozef kaj Maria tion ne sciis. Dum Jakob plukis legomojn, subite eliris el iu truo vipuro kaj mordis la manon de Jakob, kiu pro la forta doloro komencis krii. Jam svenante kun amara voĉo li diris: «Ve, ve! Vipuro aĉega mordis mian manon».

2 Jesuo staris proksime, kaj je tiu amara diro li alrapidis al Jakob kaj kaptis ties manon, kaj nenion alian li faris ol blovi sur la manon de Jakobo, kaj li refreŝigis ĝin. Kaj tuj Jakobo resaniĝis, kaj la serpento estis mortinta. Kaj Jozef kaj Maria ne sciis, kio okazis; sed al la kriado de Jakobo kaj la ordono de Jesuo ili alkuris al la ĝardeno, kaj la serpenton ili trovis jam mortinta kaj Jakobon bone sana.

XLII.

1 Sed ĉiam, kiam Jozef venis al festa manĝo kun siaj filoj Jakob, Jozef, Judas kaj Simeon kaj siaj filinoj, kunvenis ankaŭ Jesuo kaj lia patrino kun ties fratino Maria edzino de Klopas, kiun la Sinjoro Dio donis al ŝia patro Klopas kaj al ŝia patrino Anna, ĉar ili estis prezentintaj Marian, la patrinon de Jesuo, al la Sinjoro. Kaj ankaŭ al ŝi ili estis donintaj la nomon Maria por konsoli la gepatrojn.

2 Kaj kiam ili kunvenis, Jesuo sanktigis kaj benis ilin, kaj ĉiam li mem unua komencis manĝi kaj trinki. Ĉar neniu el ili kuraĝis manĝi aŭ trinki, aŭ eĉ eksidi ĉe la tablo, aŭ rompi la panon, ĝis sanktigante tion unue li estis farinta. Kaj se hazarde li ne ĉeestus, ili atendis ĝis tion li faris. Kaj kiam li mem volis aliri por refreŝiĝi, aliris Jozef, Maria kaj liaj fratoj, la filoj de Jozef. Ĉar ili tenis lian vivon antaŭ siaj okuloj kvazaŭ torĉon, kaj ili adoris kaj respektis lin. Kiam dormis Jesuo, ĉu tage ĉu nokte, ĉiam lumis super li la gloro de Dio. Al li estu ĉiu laŭdo kaj gloro por eterne. Amen. Amen.